

Carlo Minnaja

Università di Padova, Italio / Italy

Recenzo de la libro

Alcalde, Javier kaj José Salguero, red. 2018. *Antaŭ unu jarcento – La granda milito kaj Esperanto.*

Paris: Eldona Fako Kooperativa de SAT.

La redaktoroj mem deklaras ĉi libron “mozaiko”. Fakte ĝi estas kuno de brilaj eroj diverskoloraj, kiuj tamen ne konsistigas fadenon: ĉiu el ili povas esti legata aŭtonome kaj estas en si mem kompleta. Kunlaboris tridek naŭ aŭtoroj aŭ tradukintoj el diversaj tempoj, jen per personaj leteroj trovitaj en arkivoj, jen per artikoloj elfositaj el gazetoj de la unua duono de la pasinta jarcento, jen per eseoj tute freŝdataj, kiuj rakontas, komentas, komparas.

Dirindas tuj, ke la bibliografiaj elementoj estas laŭdirinde tre skrupule notitaj piednote, tiel ke ne necesas iri al alia paĝo por trovi komentojn. Tiaj elementoj estas ĉiam kompletaj: se io estas prenita el retejo, oni povas tuj aliri la koncernan paĝon.

La jaroj de la Unua Mondmilito estis ter-fracasaj kaj kred-fracasaj, kaj tion oni perceptas en ĉiu kontribuo: brulantaj vilaĝoj, rat-infestitaj tranĉeoj, ŝrapnela buĉado, milit-kaptitejo, putrinta manĝaĵo kaj la preskaŭ mirakla konscio, ke ankaŭ ĉi-foje oni eskapis morton. Abrupte rompiĝis la trankvilo, kiu dum la antaŭaj ĉirkaŭ kvar jardekoj instigis la homaron al plibonigo de la vivo ankaŭ pere de entuziasmigaj teknologiaj progresoj.

La verko proponas ĝuste tion, kion la titolo diras: “Antaŭ unu jarcento – La granda milito kaj Esperanto.” La du temoj estas traktataj preskaŭ komplete aparte; la unua parto estas historia resumo, tamen kun la supozo, ke la nuna leganto jam konas kiaj estis la nacioj, kiuj sin alfrontis ekde 1914: unuflanke la “Centraj Potencoj”, ĉefe Aŭstrio, Germanio kaj Turkio (Italio neŭtralis en la unua jaro de la milito), kontraŭflanke la Entento kun Francio, Britio kaj Ruslando, al kiu aliĝis Italio en 1915. Utilus geografia mapo de la mondo, ĉar estas menciataj iuj teritorioj, kies lokon sur la terglobo ne ĉiu kapablas tuj indiki. Oni povas ĉion trovi en eŭropaj mezlernejaj manlibroj, kvankam iuj interesaj detaloj estas spureblaj nur per lupeo. Ekzemple, la unua pafo de la milito okazis en Aŭstralio (tiam apartenanta al la brita reĝlando), ĉar tien alvenis telegramo, kiu tuj sciigis, ke Britio militdeklaris al Germanio, kaj germana ŝipo klopodis eliri el aŭstralia haveno kaj estis

per pafon konvinkita ne moviĝi. Alia menciita detalo, inter la multegaj, estas, ekzemple, ribelo de francaj soldatoj senditaj militi en Oriento; la subpremado far la armeaj ĉefoj estis forta: 23 mil procesitoj, 629 mortkondamnitaj (eble nur 55 ekzekutitoj).

Multo estas rakontata ankaŭ pri kio okazis ĉirkaŭ kaj post la milito. La bolŝevika venko de la oktobra revolucio renversis la rusan imperion, kaj miksiĝis kun la konsekvencoj de la granda milito, en kiu Rusio, partopreninte kiel membro de la Entento, estis tamen venkita de la germanoj en gravaj bataloj kaj rapidis subskribi pacon apartan longe antaŭ ol la milito finiĝis en la cetero de Eŭropo.

Eŭropaj lernejoj manlibroj malofte reliefigas la okazintaĵojn en orienta Azio; ja ankaŭ tie germanaj posedaĵoj engaĝis ŝipojn kaj terarmeojn kontraŭ Usono kaj Japanio, kiuj estis aliancanoj de la Entento. Tamen la plej grava evento, kiu difinis la rearanĝigon de la potencorilatoj sur la tuta terĝlobo, estis la kolapso de la frontoj eŭropaj. En tio la nun recenzata verko estas tre vastaspira, rakontante, ekzemple, ke la mastrumado de militkaptitejoj en Siberio estis transdonita al la japana registaro, post la foriro de la francaj, britaj kaj usonaj kontingentoj, kaj ke japanoj restis en insulo Saĥaleno ĝis 1925.

La libro ampleksas antaŭparolon, postparolon kaj tri ĉapitrojn kun titoloj respektive “La milito”, “La milito kaj Esperanto”, “Personaj memoroj”; la unuaj du havas po dek subĉapitrojn. La enhavataj eroj estas jen originale esperantlingvaj, jen tradukoj el aliaj fontoj kun eventualaj retuŝoj, kaj forte baziĝas sur taglibroj de travivintoj, unu eĉ neniam antaŭe publikigita. La lingva flanko estas apenaŭtuŝita, sed kortuŝas la desegno pri amika futbalmatĉo inter malamikaj soldatoj. Pri tia periodo kaj tia monda evento neniu verko povas esti “kompleta.” La redaktoroj mem bedaŭras pri nekompleteco. Efektive mankas multo el Azio, sed ankaŭ el la okazaĵoj en la suda eŭropa fronto: la displitiĝo de la aŭstria-hungaria armeo en somero-aŭtuno de 1918 en teritorioj italaj, slovenaj, kroataj preskaŭ ne trovas mension, kvankam ĝuste la batalo ĉe Vittorio Veneto, kiun partoprenis ĉefe italoj, kaŭzis la kolapson de la aŭstria fronto kaj la finon de la milito en Eŭropo kun la armistico de la 3a de novembro 1918, sur kies bazo poste okazis diversaj pactraktatoj. Tiun specifan nekompletecon mi bedaŭras persone, ĉar ĝuste mia patro estis unu el la “bravaj knaboj de la 99^o”, italaj deknaŭjaruloj rekrutitaj urĝe post malvenko en Caporetto (nun Koparid en Slovenio), kaj mi estus havinta pluron por rekte transdoni el liaj rakontoj.

Ja rememoroj pri antaŭ jarcento devas ĉerpi el antaŭaj generacioj. Nikolao Gudskov raportas pri sentoj kiuj ja penetris la rusan popolon: patriotismo, nobleco de Rusio en la celoj de la milito kaj en rilatoj al aliancanoj kaj al malamikoj, sed, laŭ la nuna ideologia fluo, ĉio kio estis en Rusio antaŭ

la revolucio estis ĝenerale bona, ĉiuj sekvoj de la revolucio – malbonaj. Gudskov refutas, ke la unua milito estis forgesita, kiel oni dum certa periodo verdiktis. Laŭ Lenin tiu milito estis imperiisma kaj ekspansiisma; fakte, laŭ la recenzanto li pravis, kaj revizio de tiu historia interpreto estas ideologie erara. Rusio celis malpliigi la germanan influon sur la Balkanoj kaj en Turkio, restarigi la krucon sur Sankta Sofio en Istanbul kaj forpreni de Aŭstrio Okcidentan Ukrainon.

La taglibro de la skoto Robert Murray (kun de-temp-al-tempaj etaj lingvaj misoj) rakontas pri falsigo de naskiĝdato por povi ekmiliti antaŭ ol esti 19-jara. “Apud la kaverno estis kadavrejo, kie korpoj de mortintoj kuŝis por atendi la aŭton por porti ilin al la enterigejo. Tie mi vidis la unuan fojon militmortinton. Li estis viro, kiu ricevis kuglon ĉekape dum li transiris kantante la vojon.” Teruraj estas la dummilitaj leĝoj: endormiĝo dum deĵoro kunportas proceson kaj mortverdikton far la propra armeo. Kaj oni marŝas, marŝas, marŝas; fine oni trovas lokon kun lito, sed la postan mate-non denove marŝado. Kien? Oni ne scias; al ajna loko kie estas britaj soldatoj engaĝitaj en la milito; jen, ĉi-foje al Grekio, kiu ŝajnis alproksimiĝi al la Centraj Potencoj, do oni ĝin almilitu.

La dua parto rilatas ja al esperanto, ĉefe al esperantistaj gazetoj (protagonistas *Germana Esperantisto* kun siaj militaj bultenoj finance apogataj de la germana registaro); ili raportas pri la milito, subtenante la tezojn de siaj propraj registaroj. Pro la bedaŭrata manko de sciigoj el Italio forestas la informo, ke la ĉefa gazeto esperantista itala publikigis artikolon de la itala ĉefministro, kaj la tradukinto estis Bruno Migliorini, kiu en la unua parto de la tridekaj jaroj estos vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj, post la dua mondmilito, prezidanto de la itala lingva akademio.

Longaj fragmentoj kompreneble estas ĉerpitaj el la verkoj de Zamenhof kaj de ties prikomentintoj, kiel Privat; same longaj estas tiuj el Lanti, kiu lernis esperanton dum li estis flegisto en ambulancoj (pecoj venas el Borsboom 1976). Tre oportuna ĉi tiu pluvivigo de klasikaĵoj, kiuj trovas perfektan enmarketriĝon en la recenzata verko.

Gazetoj kaj ankaŭ leteroj al familianoj raportas (tamen iom dampe kaj optimisme) pri plej malfacilaj situacioj laŭ terura tag-post-taga taglibro. Vundoj, doloroj, fizikaj penoj eĉ dum simpla marŝado: ellitiĝo, trovo aŭ netrovo de manĝaĵoj, kunpreno de kaptitoj trafataj surstrate; aviadilo minacas, sed timigite de kontraŭartilerio, forflugas. Oni spiras el tiuj linioj la haladzon de milito; germanoj kaj francoj interŝanĝas la plej krudajn akuzojn, pri la surteraj batalstrategioj kaj pri kiel estas traktataj la reciprokaj militkaptitoj, kaj certe parto de la akuzoj spegulas verajn situaciojn.

Longa artikolo de Humphrey Tonkin estas historie preciza kaj ankaŭ literaturhistorie kritika: li esploras kaj komparas la verkojn de Julio Baghy

kaj Teodoro Schwartz (poste Tivadar Soros), kiuj pasigis longajn jarojn kiel militkaptitoj en Siberio. Sed dum Baghy pasive klopodas adaptiĝi kiel eble malplej dolore al la situacio, Schwartz energie kontraŭstaras kaj fuĝas. Tonkin argumentas, ke *Viktimoj* (Baghy 1971) estas elstara en la uzado de la dialogoj: ja surprize, la interparoloj okazas en esperanto kvazaŭ ĝi estus por ĉiuj tute flua lingvo, do la raporto pri la milito iamaniere ellaboras mem lingvaĵon. Tial ke li redaktis la usonan eldonon de *Maskerado ĉirkaŭ la morto* (Soros 2001) Tonkin atente trastudis en la biblioteko de Universitato Yale la mapojn de Siberio por rekonstrui tiun revenvojaĝon de Soros, plenumitan kun forta volo kaj nekutima ruzo.

Humanan agadon de la esperanto-movado rakontas Stanislav Kamarýt: UEA peris 7000 petojn pri internigitaj, kaptitoj kaj malaperintoj. Detala tabelo pri sendoj listigitaj laŭ la monatoj kaj la jaroj montras en 1915 rekordan nombron: 97.415 ricevitaj kaj foririntaj sendoj. La nombro malpliiĝis kiam la internigitaj estis iom post iom liberigitaj. Kompreneble estis suspekto pri spionado kaj denuncioj kaj fare de francoj kaj de germanoj. 328 infanoj el Aŭstrio gatis ĉe hispanaj esperantistoj por ripozi post la teruraj militaj jaroj.

En la UEA-revuo estis rubrikoj “Niaj mortintoj” kaj “Esperantistoj militkaptitoj”. Ĝi estis malpermesita en Francio ĉar ĝi estis neŭtrala, kaj tio povis subfosi la spiriton de la francaj soldatoj ĉe la fronto; tiu malpermeso restis malgraŭ la interveno por nuligo far generalo Sébert; post jaroj montriĝis, ke la malpermeso kaŭzis idisto, kiu cenzuris ĉiujn esperanto-revuojn...

Rilatojn inter esperantismo, anarkiismo, pacismo, militrifuzado traktas specifa ese de Javier Alcalde, kies kompetenco delonge montriĝas ankaŭ en multaj aliaj kontribuoj plurloke. La lastaj tridek paĝoj estas dediĉitaj al ses personaj memoroj de esperantistoj: interesaj, kiel eble povus esti plurdekoj da aliaj.

La stilo ĉarmas, ĉar en pluraj eroj oni rekonas la pason de la jaroj: “maŝin-pafiloj” estas la mitraloj, “pafilegoj” estas la kanonoj, “eksplozilego” estas obuso. Konklude, eĉ spertuloj pri la okazintaĵoj de antaŭ unu jarcento trovas en ĉi tiu “mozaika” verko plurcentojn da informoj, kiuj ja estas spureblaj en aliaj fontoj, sed malfacile oni trovas ilin kolektitaj. Kompreneble, kiam pluraj voĉoj traktas la saman temon, maleblas eviti ripetiĝojn, kiel la informoj pri la neokazigo de la UK en Parizo en 1914, aŭ pri la letero al diplomatoj de Zamenhof, aŭ pri la profesio de Lanti. La redaktintoj bondezire esperas, ke venos kromaj verkoj, kiuj helpu al kompletigo de la kono de tiu periodo, tiom grava pro ĝiaj sekvoj kiuj ankoraŭ nun forte influas, eĉ kondiĉas, la geopolitikan situacion.

Bibliografio

- Baghy, Julio. 1991. *Viktimoj*. 6-a eld. s.l.: Fenikso.
- Borsboom, Ed. 1976. *Vivo de Lanti*. Paris: SAT.
- Privat, Edmond. 2007. *Vivo de Zamenhof*. 6-a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Soros, Tivadar. 2001. *Maskerado ĉirkaŭ la morto*. 2-a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Zamenhof, Lazaro Ludoviko. 1929. "Post la Granda Milito. Alvoko al la Diplomatoj." En *Originala Verkaro de L. L. Zamenhof*, redaktis Johannes Dietterle, 353–357. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn.

Pri la recenzanto

Carlo Minnaja (nask. 1940) estas doktoro pri matematikaj sciencoj, magistro pri historio kaj emerita katedra profesoro pri analitiko ĉe la universitato de Padova, Italio. Premiito pri kulturo de la itala ĉefministro (1990). Denaska esperantisto, dojeno de la Akademio de Esperanto kaj estro de ĝia literatura sekcio kaj de ĝia komisiono pri historio, iama vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de TEJO (1961-1966), prezidinto de Itala Esperantista Junularo, honora membro de la Itala Esperanto-Federacio. Regula kontribuanto al revuoj, ĉefe *Literatura Foiro*, per recenzoj kaj eseoj.

Retadreso: carlo.minnaja@gmail.com

About the reviewer

Carlo Minnaja (1940) holds a PhD in mathematical sciences and an MA in history, and is a chair professor (now retired) in mathematical analysis at the University of Padua, Italy. Italian Prime Minister's Culture Award (1990). He is a native Esperanto speaker, doyen of the Academy of Esperanto and head of its commission on history, former general secretary of the World Esperanto Youth and president of the Italian Esperanto Youth, honorary member of the Italian Esperanto Federation. Regular contributor to magazines, mainly *Literatura Foiro*, with reviews and essays.

Sul recensore

Carlo Minnaja (n. 1940) è dottore in scienze matematiche, laureato in storia e professore di ruolo (in pensione) presso l'Università di Padova. Premio della Cultura della Presidenza del Consiglio dei Ministri (1990). Parla esperanto dalla nascita, è il decano della Accademia di Esperanto e direttore della sua commissione di storia; già segretario generale della Organizzazione Mondiale della Gioventù Esperantista e presidente della Gioventù Italiana Esperantista, membro onorario della Federazione Esperantista Italiana. Contribuisce regolarmente a riviste, principalmente a *Literatura Foiro*, con recensioni e saggi.